

DIABLETO

TIMIGA VERKETO POR JUNULOJ

A young boy with brown hair is the central figure. He is wearing a black turtleneck sweater and has a single, thick, red, textured devil horn attached to his head. He is covering his eyes with his right hand, which is held flat against his face. He is leaning against the rough, brown bark of a tree trunk on the left side of the frame. The background is a dense, out-of-focus green forest. The overall mood is mysterious and slightly ominous.

KJELL E. GENBERG

Versio 1.0 (2026/01/28)

El la sveda tradukis Johannes Genberg, 2026.

<https://miavivo.net>, <https://esperanto.one>

Sveda titolo: En liten djävul.

© Kjell E. Genberg, 2001 kaj 2026.

<https://kjellegenberg.se>.

Kovrila bildo de Vika_Glitter (ĉe Pixabay).

La bildojn sur la paĝoj 5 kaj 28 desegnis SYG_Anime (ĉe Pixabay)

kaj la bildon sur la paĝo 5 modifis Johannes Genberg.

La bildo sur paĝo 27 estas el la retejo de la aŭtoro.

Libere elŝutebla kaj nekomerce disdonebla bita versio kun permeso de la aŭtoro. Kontakto Kjell E. Genberg por aliaj uzoj: kjell.e.genberg@keg.se.

Ĉapitro 1

La malbeno

"Ĉu ni ne havas amuzajn librojn hejme?" kriis Linda. "Mi jam legis ĉiujn miajn."

"Ĉu vi ankoraŭ havas forton legi pliajn?" demandis la patrino desube en la kuirejo. "Vi havas nazkataron kaj febron. Tiam oni kuŝu kaj ripozu, ne streĉu sin."

"Ba. Plenkreskuloj komprenas nenion", murmuris Linda. "Kredante ke mi ankoraŭ estas infaneto kvankam mi estas baldaŭ 15-jaraĝa."

Ŝi ellitiĝis el la tro varma lito kaj eliris el sia ĉambro.

Ekster la ĉambro la frateto Johano ludis. Li estas nur kvar-jaraĝa. Ĝuste nun li estis okupata. Li penis kunigi trajnon el LEGO-o kun ŝarĝaŭto per elektra kablo. Linda stumblis pro la kablo. Ŝi silente malbenis la frateton, kiu neniam tenas ion ajn en ordo.

La patrino metis teleraron en la pendoŝrankon kiam Linda preterpasis la kuirejan pordon. Linda iris plu en la vivoĉambron por vidi, ĉu io troveblas en la librobretaro.

"Mi ja vidas vin", diris la patrino, dum ŝi fermas la pordeton de la manĝilarolavilo. "Vi ne estu ellite kiam vi estas malsana. Reiru tuj en la liton. Mi devas iri por fari aĉetojn. Ne plu estas io ajn en la hejmo."

"Jes, ja. Mi iros", murmuris Linda, kiu nur malatente aŭskultis.

"Vartu vian frateton dum mi estas malhejme", kriis la patrino en la antaŭĉambro.

"Kiel mi tiel faru se mi devas enlitiĝi?"

La patrino ne aŭdis tion. Ŝi jam fermis la dompordon post sia eliro.

Linda altiris seĝon kaj komencis ŝovserĉi libron sur la supraj bretoj. Kio troveblas sur la malsupraj, tion ŝi jam scias. Neniu el ili interesas ŝin.

Nek ŝajnis esti io interesa inter la supraj libroj. Malnovaj, mezbonaj krimromanoj, kiujn paĉjo ŝatis legi. Ju pli malnova, des pli bona, li evidente pensis.

Jen staris tuta serio pri malmojosa angla detektivo nome Cardby. Linda jam provis legi unu, sed ŝi ne povis finlegi eĉ la unuan ĉapitron. Ĝi estis tiel terure enua ke ĝi meritas esti ĵetita kontraŭ la muron.

Tamen, malantaŭ la libroj kun la ruĝaj dorsoj ŝi ekvidis ion. Piedpinte ŝi etendis sin kaj sukcesis eltiri difektan, malnovan libregon. Kelkaj el la folioj malfiksiĝis kaj falis sur la plankon.

Linda malsupreniris de la seĝo kaj komencis kolekti la foliojn. Ŝi intencis reenmeti ilin en la libregon kaj remeti ĝin sur la breton, antaŭ ol iu rimarkas kion ŝi faris.

Sur bildo ŝi vidis strangan stelon. Sub la bildo estis skribite, ke tiu stelo nomiĝas *pentagramo*. Ĝi aspektis tiel amuza, ke Linda komencis legi. La teksto enhavis longajn, nekompreneblajn rimojn kun malfacilaj vortoj.

Ŝi devis al si mem laŭtlegi por sukcese povi legi la enhavon.

"Hoc et corpus..."

"Diavolo arribe..."


En la sama tempero ŝi eldiris tiujn vortojn, ŝi aŭdis el la kuirejo laŭtan krakon.

Ŝi lasis la libregon fali kaj kuris tien. Sur la manĝilarolavilo staris la frateto kaj aspektis esti feliĉa. Sub li, sur la planko, estis granda amaso da porcelanaj rompaĵoj. En la supra breto faŭkis granda malpleno, en kiu antaŭe staris aro da teleroj. La belaj dimanĉaj teleroj kun oraj randoj.

"Vi estas diableto!" kriis Linda.

Ekbriliĝis la okuloj de la frateto. Tuj poste granda ridetaĉo vastiĝis sur lia malgranda, ronda vizaĝo.

"Jes", li respondis.



Ĉapitro 2

La frateto

Linda surplankigis lin.

Ŝi ektemis, ĉar lia haŭto estis malvarma kaj glueca, kiel la haŭto de bufo. Estis naŭza.

"Kion vi faris, abomena infano?" ŝi kriis kun ŝaŭmo. "Vi estas kvazaŭ plena de malvarma gluo! Kaj la belaj porcelanaĵoj. Supreniru kaj ludu unuopule, mi forbalau ĉi tiujn. Vi atendu la rehejmiĝon de panjo. Ŝi riproĉos vin pro ĉi tio."

La frateto donis al ŝi rigardon tian malican, kian ŝi neniam antaŭe vidis. Sed li foriris de la kuirejo kaj post sekundo ŝi ne plu pensis pri lia rigardo.

Ŝi kolektobalais la pecojn kaj enĵetis ilin en la rubsakon. Ĝi pleniĝis kaj ŝi iris ĵeti ĝin en la eksterdoman rubujon. Kiam ŝi revenis ŝi ne povis malfermi la pordon. Ĝi memŝlosiĝis kaj tiam ŝi sentis, ke subite multe pli malvarmiĝis.

Linda frapadis la pordon kaj sonorigadis la sonorilon, sed el la interno aŭdeblis neniu sono. Portante maldikan ĉemizon, ŝi ekmalvarmiĝis.

"Johano!" ŝi kriis. "Venu malfermi. Mi senintence ŝlosis la pordon."

Neniu respondo, neniu sono el la interno.

Linda iris al la malantaŭo de la domo por eniri tra la aŭtejo. Normale, ties pordo estas malŝlosita – sed ne nun.

Malvarmis. La haŭto anserhaŭtiĝis kaj ĉiuj malgrandaj, helaj haretoj sur la brakoj kaj kruroj staris kvazaŭ en atentpozicio.

Ŝi estis tute blufrostiĝinta kiam ŝi finfine ekvidis ĉe la vojo la patrinon, kiu estis trenanta du grandajn sakojn kun aĉetaĵoj. Linda svingis la manon kaj la patrino komencis marŝi pli rapide.

"Je Dio, kion vi faras ekstere dum vi estas malsana?" demandis la patrino. "Mi ja diris al vi, ke kuŝiĝu!"

Linda diris ĉion, kio okazis dum la patrino estis malŝlosanta la pordon. Kiam ŝi malfermiĝis, ekflaris ambaŭ la brulodoron.

Estis Linda, kiu unue reprenis la memregon.

"Fajras!" ŝi kriis.

Ĉapitro 3

La fajro

La patrino falmetis la sakojn kaj ekkuris supren, en la duan etaĝon. Sidis sur la planko la ravita frateto, rigardanta la brulantan fenestran kurtenon.

Ili bezonis nur kelkajn minutojn kaj la saman kvanton da siteloj da akvo por estingi la fajron.

"Ĉu vi ludis per alumetoj?" kriis la patrino al Johano. "Mi ja diris, ke vi ne rajtas!"

La frateto skuis la kapon.

La rigardo, kiun Linda antaŭe vidis en liaj okuloj, reaperis, kune kun la ridetaĉo, kiu faris lian vizaĝon terura, kvankam ĉiuj ĉiam diras, ke ĝi estas tiel dolĉa.

"Mi ne ludis per alumetoj", li diris. "Tiajn mi ne bezonas..."

"Vi mensogas, infanaĉo!" diris la patrino kolere. Ŝi ne plu povis regi sin kaj donis al li grandan vangofrapon.

Li falis planken, sed ne kriis. De liaj lipoj venis neniun sono. Li fikse rigardis al la patrino kaj Linda.

"Vi estas malbonaj", li glacimalvarme diris. "Tiaj vi ne estu al mi!"

Li stariĝis kaj iris al la fenestro. Tie li karesis per la fingroj la malsekan, fulgonigran kurtenon.

"Rigardu!" li diris. "Fajras!"

La patrino iris tien kaj rigardis. Ardis sur la kurtenorando. Ŝi rapide eliris por preni pli da akvo kaj estingis la bruladon.

"Bone ke vi rimarkis tion", ŝi poste laŭdis. "Alie, la kurteno eble ekdisfajrus sen ies rimarko."

Linda rigardadis kun grandaj okuloj la frateton. Ŝi ĵus kontrolis la kurtenon. Tiam la fajro estis tute estingita. Kiam li per la fingroj karesis la ŝtofon, ĝi ekbruliĝis.

Ŝi ne kuraĝis sciigi pri sia malkovro. Panjo neniam kredus ŝin.

Sed kiel li? Kial...?

Tiam ŝi rememoris pri la librego en la vivoĉambro. Ŝi laŭtleĝis ĝin. Poste venis la krako kaj ŝi kriis "Vi estas diableto" al Johano. Ĉu li tiam ĝi *fariĝis*...?

Ŝi rapide malsupreniris laŭ la ŝtuparo. Evidente, oni povas per la librego transformi fratetojn al diabletoj. En tiu okazo, oni devas povi retransformi diableton al frateto.

La librego restis sur la planko. Ŝi rapidis por preni ĝin. Kiam ŝi enmetis la elfalintajn paĝojn en la libregon, la tuta librego fariĝis polvo inter ŝiaj fingroj.

Malantaŭ ŝi, ŝi aŭdis akran, malican ridadon kaj kiam ŝi turnis sin, staris la frateto en la pordokadro.

Ĉapitro 4

La tranĉilo

Nenio rimarkinda okazis en tuta semajno. Linda evitadis la frateton.

Nenion alian ŝi kuraĝis fari.

Ŝi tamen fariĝis malatentema. Pro la veno de ŝia 15-a naskiĝtaga festo fariĝis tiel urĝe. La patrino estis en laborejo kaj ŝi mem prenis libertempon de la lernejo por finfari la aranĝojn.

Kvazaŭ atendeble, Johano ekhavis nazkataron kaj devis esti hejme de la infanejo. Malgraŭ tio, la patrino iris labori. Linda estis en treege malbona humoro – ne nur pro tio, sed ankaŭ ĉar la pakaĵo sur la plej supra breto en la vestejo ne enhavas ŝminkon – la aĵon, kiun ŝi deziras. Panjo kredis, kompreneble, ke ŝi zorge kaŝis la pakaĵon. Ŝi neniam scios ankaŭ pri tio, ke Linda kaŝmalfermis ĝin.

Sed tielis. Tial Linda jam sciis, ke la pakaĵo enhavas solan lumdiskon¹ envolvitan en multe da silkpapero en ŝuoskatolo. Jen tipa plenkreskula serĉhumoro!

Por fari la malfeliĉon plena, la lumdisko estis de *Spice Girls*², kiujn Linda ne plu ŝatis dum jam preskaŭ 8 monatoj.

Ŝi estas tranĉanta la salaton kiam Johano malsuprenvenis de sia ĉambro. El lia nazo fluis kaj ŝi arde diris al li, ke li iru en la necesejon por viŝi sin.

1 Lumdisko (aŭ Kompakta Disko, KD) = Ronda disko enhavanta muzikon aŭ datumon, populara antaŭ la alveno de interretaj elsendfluaĵ servoj.

2 Spice Girls estis popmuzika grupo el Britio, kiu estis treege populara antaŭ kaj ĉirkaŭ la jaro 2000.

Sur la kuireja tablo kuŝis glacilaktuko, ordinaraj laktukaj folioj, boligitaj ovoj, porkaĵo kaj tomatoj. Linda staris ĉe la tralavujo kaj estis malfermanta konservoskatolon da tinusaĵo.

("Frenezulo", diris la vira amiko Kirro. "Oni ja ne povas miksi porkaĵon kun tinusaĵo..." Sed tion oni povas. Linda vidis plurajn receptojn kun ili.)

Kiam ŝi turnis sin, staris la frateto ĉe la tablo. Li prenis la akran kuirejan tranĉilon. Denove liaj okuloj havis la rigardon saman kiel antaŭe.

"Lasu ĝin!" ŝi kriis. "Vi povas tranĉvundi vin."

"Bela tranĉilo", li diris kun voĉo, kiu estis preskaŭ flustro. "Ĉu ĝi ne estas bela?"

"Lasu la tranĉilon!"

"Ne. Mi volas ludi kun vi... per la tranĉilo."

Li tenis la tranĉilon alte, la pinton direktanta al ŝi.

"Ĉu vi vidas kiom ĝi brilas, Linda?"

Li ridetis al ŝi. La okuloj brulis.

"Se oni estas sufiĉe proksima, oni povas vidi sian respegulitan bildon sur la tranĉilo. Jen, rigardu...!"

Linda estis freneze timanta.

Ŝi jam levis siajn manojn por defendi sin. La pinto de la tranĉilo estis tuj antaŭ ŝi.

"Ĉesu!" ŝi kriis. "La tranĉilo estas akra... Ĝi estas danĝerega."

"Jes, Linda, ĝi estas danĝerega", respondis la frateto. "Treege danĝerega!"

Linda regresis. La frateto sekvis ŝin. La tranĉilo estis senĉese direktata al ŝia gorĝo.

La pordo al la balailejeto estis tute malfermita. Linda konsideris salti enen kaj fermi la pordon. Sed ĝuste kiam ŝi staris ĉe la pordotruo, ŝi sentis la tapiŝbatalilon el bambuo sur sia brako.

Ŝi tuj eltiris ĝin kaj per ĝi malmilde frapis la manon de la frateto. Li kriis kaj maltenis la tranĉilon.

Linda ne komprenis kiel ŝi kuraĝis – sed ŝi kaptis Johanon kaj trenis lin supren laŭ la ŝtuparo. Poste, ŝi ĵetis lin en lian ĉambron kaj ŝlosis la pordon de ekstere.

Ŝi poste devis sidiĝi dum tempo por atendi la malfortiĝon de la korbatado. Dum la tuta tempo ŝi aŭdis lin krintan alte kaj akre.

Ŝi ne zorgis pri tio.

Ŝi simple ne kuraĝis zorgi.

Kiam la patrino revenis hejmen je kelkaj horoj poste, Linda parolis pri tio, kion Johano faris per la tranĉilo. Sed tio ŝajne ne multe maltrankviligis la patrinon.

"Ĉu vi diras, ke vi restigis la infanon en la ĉambro dum la tuta tago?" ŝi anstataŭe diris kolere. "Mi neniam aŭdis ion tiel teruran. Mi devus nuligi vian naskiĝtagan feston kiel puno."

La patrino rapidis laŭ la ŝtuparo supren kaj malŝlosis la pordon. Linda povis aŭdi ŝian konsolantan voĉon dum ŝi dorlotis la infanon.

"Pri mi ŝi tute ne pensas", murmuris Linda al si mem. "Ŝi prifajfus se mia gorĝo estus detranĉita... Patrinoĉoj bonzorgas nur la plej junan infanon!"

Linda malsupreniris al la kuirejo kaj daŭrigis la preparojn. Ŝi ĝustatempe finfaris la salaton kiam la amikoj alvenis.

Ĉapitro 5

La festo

Ankaŭ inter la ricevitaj donacoj ne estis ŝminko. Sed ŝi almenaŭ ekgajiĝis kiam ili laŭdis ŝian salaton.

Kirro sonis tre surprizita kiam li diris, ke porkaĵo kun tinusaĵo estas ne malbona kombino. Tion li ŝajne ne atendis.

"Jen vi havas", pensis Linda.

Ili finmanĝis kaj iris en la vivoĉambron. Linda ekludis la naskiĝtagan lumdiskon kun Spice Girls. Ĝi ja almenaŭ taŭgis por dancado.

Eva kaj Mariana komencis danci unu kun la alia, sed baldaŭ ankaŭ Lello kaj Petro aliĝis al la danco. Linda sidis sur la sofo kaj atendis la inviton de Kirro, sed li estis okupata trarigardi la muzikalbumojn.

Ŝia humoro fariĝis pli kaj pli malbona. "Ĉu li ne baldaŭ venos inviti min al danco?"

Ŝi sentis, ke la aliaj knabinoj rigardas ŝin kun iom da senrespekto, sed tio eble estas nur imago.

Subite ŝajnis, ke la voĉo de la kantistino malaperis el la muziko.

La paroj sur la planko haltis. La kolero de Linda ne malgrandiĝis. Panjo ne nur aĉetis ion, kion ŝi ne volis, ŝi ne eĉ povis aĉeti funkciaĵon lumdiskon!

"Kion ŝi kantas?" diris Kirro kaj haltigis la lumdiskon. "Mi aŭdis kvazaŭ 'Bonvenon al Infero'."

Kirro reenigis la lumdiskon. Dume Linda vidis la frateton en la pordokadro de la vivoĉambro. Li ree havis tiun esprimon en siaj okuloj. Linda ekstremitis.

Kirro reŝaltis la lumdiskilon. Ĉi-foje Spice Girls kantis ĝuste ĝis la fino, sen iu ajn aŭdebla strangaĵo.

"Strange", diris Kirro. "Ĉu vi ne aŭdis ion strangan antaŭe?"

Tion ĉiuj aŭdis. Sed nun io alia estis pli grava – la danco rekomenciĝis.

Mariana kaj Lello dancis proksime, multe pli proksime ol kutime. Ili rigardis neniun krom unu la alia kaj subite ili dance puŝis la frateton, kiu falis.

Li iom ĝemetis kaj stariĝis dum Mariana kaj Lello dancadis en la ĉambromezon.

Post minuto plankenfalas Mariana. Ŝi ĉirkaŭpremis sian ventron kaj komencis plorĝemi pro doloro, tordiĝante en turmento.

La aliaj rapide venis kaj demandis, kio estas al ŝi. Mariana povis apenaŭ paroli, sed ŝi komprenigis, ke ŝia ventro doloras tiel, kvazaŭ ĝi krevos.

Ili venigis ŝin en la necesejon, viŝetis ŝian frunton per akvo kaj post iom da tempo, ŝi vomis. La doloro komencis ĉesi.

"Devas esti pro la salato", diris Kirro. "Mi ja sciis, ke tunisaĵo kun porkaĵo ne bonas kune."

"Maleble! En tiu kazo, ĉiuj devus malbonfartiĝi", diris Linda. "Mi ĵuras, ke ĉiuj krudaĵoj, kiujn mi aĉetis, estis freŝaj kaj bonaj."

Ŝi rapidis kuirejen por vidi, ĉu la manĝaĵo iel estas malbona. Sur ŝia telero estis granda porcio da salato, kvankam ŝi estis certa, ke ŝi jam manĝis ĉion. Ŝi ekrigardis la teleron pli proksime – kaj ekkriis pro abomeno.

Inter folio de salato kaj iom da porkaĵo ŝin fikse rigardis mukeca okulo.

Ŝi turnis sin tuj por kuregi for, sed haltis abrupte. La frateto staris sur la sojlo.

"Bona Linda... vi estas dolĉa", li diris, sed la brilo en lia rigardo kaj la malica ridetego sur la vizaĝo montris, ke li celis ĝuste la malon.

La amikoj rapide forlasis la feston. Ŝi povis aŭdi ilin murmuri sur la ekstera ŝtuparo.

Linda reste sidis en la kuirejo kaj ploris. Ĉio fariĝis malsukcesego. Ne helpis ŝin la konsolpenoj de la patrino.

"Vi komprenas nenion!" diris Linda. "Pri ĉio kulpas la frateto. Estas io stranga pri tiu infano. Mi kredas, ke lin okupas Satano."

"Frenezaĵoj!" respondis la patrino, kiu apenaŭ povis sin deteni de rido. "Ĉu nia dolĉa knabeto estus plena de malbonaj spiritoj?"

"Je-es!" Linda diris malhezite kaj parolis pri la okulo en la salato.

La patrino iris rekte en la kuirejon kaj rigardis la teleron. Kompreneble tie okulo ne troviĝis – nur duono da ovo kun peco da nigra olivo sure.

La patrino vokis ŝin por ke ŝi venu kaj rigardu mem. Linda stariĝis tre malvole.

"Jen vi vidas", diris la patrino. "Io timigis vin kaj tiam vi misvidis ovon kiel okulo. Vi nur imagis ĉion."

Linda skuis sian kapon. Ŝi viŝis la larmojn per la mandorso.

"Tion mi tute ne faris", ŝi firme asertis. "Ĝi ne estis ovo kiam mi vidis ĝin. Ĝi estis okulo. Mi scias, kion mi vidis."

Sed Linda komprenis, ke ne sencas pridiskuti la aferon. Panjo neniam komprenos, ke estas io stranga pri Johano.

Kiel ŝi komprenus? Johano – la plej amata infano!

Do, anstataŭ peni komprenigi Linda iris enlitiĝi.

Ĉapitro 6

La malapero

Ŝi vekigis frue pro ke la patrino ekkriis laŭte en la ĉambro de Johano.

Linda stariĝis kaj rapidis tien.

Ŝi atendis, ke Johano estas faranta kaĉon el la patrino. Sed ne estis tiel.

Johano ne eĉ estis tie.

"Ni devas serĉi lin", kriis la patrino. Vestu vin.

Ili serĉis dum horoj ĉirkaŭ la tutan areon, rigardis en ĝardenojn kaj demandis la najbarojn, ĉu ili vidis Johanon.

Sed neniu sciis ion, neniu vidis lin je tiu mateno.

Fine, la patrino fariĝis tiel malespera, ke ŝi vokis la policon, kiu sendis polican aŭton.

La patrino kaj Linda donis la personpriskribon de la etulo. La du viroj en la blankblua polica aŭto forveturis. La aŭto iris kelkajn fojojn ĉirkaŭ la kvartalon. Poste, evidente venis tempo por kafopaŭzo ĉe la policejo.

Kaj la polica aŭto neniam revenis.

La patrino sidiĝis en la kuirejo, tute senkuraĝigita. Ŝi penis elpensi kie Johano povas kaŝi sin, sed povis eksupozi ne eĉ unu lokon.

Estis Linda, kiu unue ekvidis la frateton. Li estis nigra pro fulgo kaj oleo kiam li rampis el rompita aŭteja fenestro de la apuda domo, kiu estis nelogata dum kelkaj monatoj.

"Panjo!" ŝi kriis. "Mi trovis lin."

"Ĉu vi? Kie li estas?"

La reunuiĝo fariĝis ekzakte tiel, kiel Linda atendis. Unue la patrino brakumis la infanon, poste ŝi riproĉis lin kaj laste ŝi banis lin.

Kiam tio finiĝis, ŝi telefonis al la policejo kaj diris, ke Johano estas trovita.

Ĉapitro 7

Skanseno

Nesurprise, Johano fariĝis malĝoja pro ĉiuj riproĉoj.

Linda nazblovetis malestime kiam la patrino diris, ke ili iru al *Skanseno*³ por ke la huliganeto ricevu la konsolon, kiun li ial bezonis.

Kvankam la patrino sciis, ke Skanseno estas tedega por Linda, ŝi diris ke ili ĉiuj iru.

Linda sentis eĉ plian malagrablon ol antaŭe kaj ŝi ne komprenis, kio estas la kialo.

"Mi volas glaciaĵon!" diris Johano kaj la patrino aĉetis glaciaĵojn por ĉiuj.

Ili promenis ĉirkaŭ Skansenon, manĝis glaĉiaĵojn, rigardis katidojn kaj elefantojn kaj blankajn ursojn, kiuj ŝajne sentis sin terure malkomfortaj en la varmo.⁴

Poste, ili alvenis al la fiŝujego. Tiam Linda fariĝis iom pli bonhumora. Ŝi ekvidis tre belan, ruĝstrian fiŝon, kiu naĝis en la klara akvo.

"Ĉu tiu ne estas bela fiŝo?" ŝi diris al Johano.

"Ĉu tiu?" demandis la frateto kaj per fingro montris al la sama fiŝo.

"Jes."

En tiu tempero la ruĝstria fiŝo ektemis kvazaŭ pro kramfo. Post nur kelkaj sekundoj ĝi ekleviĝis akvosurfacen kun la ventro direktanta supren.

Linda kredis, ke ŝi svenos. Ŝi ne kuraĝis eĉ rigardi la frateton.

³ Skanseno estas fama, subĉiela, sved-teme etnografia muzeo kaj bestoĝardeno en Stokholmo, Svedio.

⁴ La lasta blanka urso estis vendita en 1984, pro ke Skanseno ne havis sufiĉe malvarman lokon por ili. Pro nova leĝo, la spaco por la elefantoj ne plu sufiĉis, kaj la lastaj estis venditaj en 1990.

Anstataŭe, ŝi rigardis la patrino, kiu, kompreneble, nenion rimarkis.

Dum ili restis en Skanseno, Linda penis esti kiel eble plej malproksime de la frateto. Post tempo la patrino ekkomprenis, ke Linda ne kondutas kiel kutime.

"Ĉu vi ne fartas bone?" ŝi demandis.

"Mi fartas bone."

Johano laciĝis pro la hodiaŭa ekskurso kaj tial la patrino povis enlitigi lin frue post la hejmiĝo. Linda kaj la patrino ne dormis kaj rigardis la televidilon ĝis malfrua vespero. "La programo ne estas bona", pensis Linda, kaj ŝi ankaŭ voĉe sciigis pri tio.

"Vi pravas", diris la patrino. Ŝi foliumis la vesperan ĵurnalon ĝis la TV-programaro. "Ŝajnas, ke ankaŭ morgaŭ ne estos io bona. Ĉu ni do luan filmojn?"⁵

"Tion ni faru", diris Linda. "Sed ne elektu tian, kian nur plenkreskuloj ŝatas."

"Ho, ne", ridis la patrino. "Mi luan vere timegan Drakulo-filmojn por ni."

Post ili ordigis sian malordaĵon, Linda iris enlitigi. La patrino venis kaj brakumis ŝin *bonan-nokton-e* antaŭ ol ŝi mem enlitigi.

Estis kvazaŭ kiel antaŭ la naskiĝo de Johano. En la tempo, kiam paĉjo loĝis kun ili...

Linda provis iom leĝi libron, sed ŝi nur havis la forton por kelkaj paĝoj. Ŝi malŝaltis la lampon super la lito kaj tuj poste ekdormegis.

Post kelkaj horoj, ŝi vekigis pro laŭtaj sonoj ekster la domo.

5 Antaŭ la apero de elsendfluaĵ servoj, oni devis mem iri al filmoluejo por luan filmojn sur, ekzemple, DVD.

Ĉapitro 8

Unu plia fajro

Lindas kuris ĝis la fenestro kaj rigardis eksteren. Sur la strato apud la domo estis pluraj estingoaŭtegoj kun siaj blulumoj ŝaltitaj kaj homoj kuris jen tien jen reen.

Ŝi kelkajn fojojn enflaris kaj klare sentis la odoron de brulfumo. Kiam ŝi ekrigardis al la domoj kontraŭ la strato ŝi povis vidi sur iliaj fenestroj grandajn flamojn respegulante de la vitroj.

Suprenirante laŭ la ŝtuparo ŝi renkontiĝis kun la patrino. Ili kune rapidis al la ĉambro de la frateto. Li estis maldorma.

Li staris sur seĝo ĉe la fenestro kaj observis la brulantan apudan domon. De lia fenestro klare videblis, ke plej brulas en ties aŭtejo.

Brilis kaj ardis la okuloj de la frateto. Linda estis tute certa, ke tio ne estas pro la reflektado de la flamoj.

La patrino kaj Linda staris en ŝoko ĉe la pordokadro de la ĉambro de Johano kaj rigardis kiel la 4-jaraĝa etulo ĝuis la fajron ekster la fenestro.

Neniu el la du povis dubi ke li kulpas pri la fajro. La malgranda korpo aspektis luma kaj de la interno kaj de la ekstero. La ronda vizaĝo estis tordinta al malica ridetego, kiu faris lin aspekti tre maljuna. La pupiloj ŝajnis flami pro ĝuego.

"Ĉu vi nun komprenas?" demandis Linda.

La patrino kapjesis en silento.

Ekstere ankoraŭ forte fajris, sed la fajroestingistoj komencis venki la fajron.

La patrino prenis la manon de Linda. En silento ili iris for de la ĉambro de Johano kaj zorgis fermis la pordon de la ĉambro kun la infano interne.

"Ĉu vi vere kredas, ke en li estas diablo?" demandis la patrino time.
"Kiel do tio okazis?"

Linda parolis pri la librego de nigra magio, kiun ŝi trovis malantaŭ la aliaj libroj sur la breto antaŭ ĉirkaŭ semajno. Pri kiel ŝi voĉlegis sorĉan skribaĵon dum Johano grimpis sur la manĝilarolavilon en la kuirejo kaj faligis aron da teleroj sur la plankon kaj disfrakasis ilin.

Ke ŝi tiam kriis "Vi estas diableto!" – kaj en tiu tempero li transformiĝis.

"Devas esti skribita en la librego kiel retransformu lin!" diris la patrino trankviliĝe.

Linda kapjesis.

"Mi kredas tion. Sed kiam mi prenis la libregon por relegi tiun paĝon, ĝi fariĝis polvo... La librego ne plu ekzistas."

"Je Dio, kion ni do faru?" ĝemis la patrino.

"Mi ne scias", respondis Linda. "Ĉiuokaze, ni ne povas paroli pri tio ĉi al iu ajn."

"Ne, ĉar oni do enŝlosos nin en frenezulejon."

Ili sidiĝis sur la stuparon kaj prenis la manojn de unu la alia la tutan nokton.

Ekstere, la fajroestingistoj senĉese laboris por estingi la tondrecan fajron. Iliaj krioj kaj interparoloj estis klare aŭdeblaj sur la ŝtuparo, kie la patrino kaj Linda sidis en silento kaj timo.

Je la mateniĝo la estingoaŭtegoj estis for – krom unu, kies fajroestingistoj restis por zorgi pri la finestingo.

La patrino eniris en la ĉambron de Johano. Li estis dormanta sur la planko. Ŝi enlitigis lin kune kun suĉilo kaj lia ŝatata felto.

Dormante, li aspektis same dolĉa kaj aminda kiel ĉiam. Ŝi ĝemis kaj malsupreniris al la kuirejo por prepari matenmanĝon.

Kvankam Linda estis lacega, ŝi iris al la lernejo tiun tagon. La patrino akompanis Johanon al la infanejo antaŭ ol iri al la laboro.

Kiam ŝi iris por rehejmigi lin je la posttagmezo, ŝi demandis kiel li kondukis.

"Kiel ĉiam", respondis la surprizita infaneja vartisto. "Kial vi demandas?"

La patrino tuj reprenis la memregon.

"Okazis fajro en la apuda domo hieraŭ nokte", ŝi klarigis. "Li dormis tiel malmulte kaj tiel malbone pro la bruado."

Ĉapitro 9

La kruco

Vespere, Johano rifuzis enlitiĝi. Li intencis nepre kuŝiĝi sur la sofo en la vivoĉambro. Nek Linda nek la patrino kuraĝis kontraŭi lin.

La patrino, malgraŭ ĉio, kio okazis, ne forgesis lui la filmon pri kiu ili parolis la antaŭan vesperon. Estis filmo pri la kruela Grafo Drakulo.

Kiam ili kredis, ke Johano ekdormis, ili komencis rigardi la nervekscitan filmon.

Drakulo logis junan paron en sian kastelon. Sed kiam li estis mordonta la kolon de la virino por suĉi ŝian sangon, li subite retiriĝis. La virino portis krucon kiel kolornamaĵon.

Tiam stranga sono venis de la sofo.

Kiam la patrino kaj Linda turniĝis tien, ili vidis, ke la vizaĝo de Johano fariĝis cindrokolora. Li fikse rigardis en timo la kurcon en la televidilo.

"Li ne eltenas la kristanan simbolon!" diris la patrino. "Jen eble la solvo!"

"Mi iru preni mian kristanokonfirman ornamaĵon", ekkriis Linda.

Ŝi hastis en sian ĉambron. En la malgranda juvelujo kun konko sur la kovrilo ŝi serĉis la ornamaĵon, kiun ŝi ricevis post ŝia konfirma ceremonio. Jen maldika kolĉeno el arĝento kun kruco. Poste ŝi kuris reen suben.

La patrino jam haltigis la filmon kaj ŝaltis la plafonlampon.

Johano kviete kuŝis sur la sofo kun duone fermitaj okuloj.

"Ĉu vi konas 'Patro nia'?" demandis Linda.

"Mi kredas ke jes", diris la patrino.

"Do diru ĝin!"

La patrino komencis mallerte deklami la malnovan preĝon. Johano ekstremis kaj malfermis la okulojn.

Kiam li vidis Linda-on svingantan la krucon tuj antaŭ la vizaĝo, li ŝajne ekfreneziĝis.

Ĉapitro 10

La transformiĝo

Li kriis laŭte kaj svingis la brakojn, sed ne kuraĝis tuŝi la ornamaĵon. Dume, sur lia vizaĝo okazis terura transformiĝo. La lipoj fariĝis maldikaj kaj tute bluaj. La blanka infanohaŭto fariĝis sulkoplana kaj raspa. Aperis sur ĝi veziketoj, kvazaŭ tiuj de maljuna bufo. Subite la frateto aspektis kiel tre maljuna viro. La hararo stariĝis vertikale kaj li montris la dentojn per minaca lupo-grimaco.

Linda retiriĝis kaj la patrino ĉesis deklamadi la preĝon.

"Ne!" ŝi kriis. "Ne forprenu la krucon. Ĝi efikas!"

Linda kunpremis siajn dentojn kaj iris unu paŝon pli proksime al la frateto.

La tempo ŝajnis haltiĝi. Sentiĝis tiel, ke jam eterno pasis post kiam ŝi estis supre kaj serĉis en la juvelujo.

La buŝo de la frateto estis formita al krio de sufoka timo, sed neniu sono pasis tra la maldikaj, bluaj lipoj.

Subite glugla sono venis el lia gorĝo.

Li malfermegis la okulojn, la haŭto sur la frunto aspektis esti krevanta. Io blueta lumis en la buŝa kavo. Ĝi lumigis la vizaĝon de la interno tiel, ke ĝi aspektis kiel kranio.

Tiam elĵetiĝis blua fulmo el la buŝo de la frateto. Ĝi arke kirlmoviĝis trans la ĉambro kaj forflugis kun fajfo tra la duone malfermita balkona pordo.

Ĉapitro 11

La dolĉulo

La frateto rekuŝiĝis sur la kusenon de la sofo. Li subite aspektis kiel sia vera memo.

La bufeca haŭto kaj la sulkoj estis for. La rigardoj, kiujn li donis al Linda, estis la plej afablaj kaj karaj, kiujn ŝi vidis en siaj 15-aj vivjaroj.

"Linda", li diris. "Kion vi faras? Ĉu vi ludas per tiu ornamaĵo?"

Li montris per sia fingro al la kruco.

"Mi nur volis scii, ĉu vi estas maldorma", ŝi diris pene. "Ĉu ankaŭ vi volas ludi per ĝi?"

Li etendis sian malgrandan manon kaj prenis la ornamaĵon.

"Vi estas bona", li diris. "Mi ŝatas vin. Vi estas dolĉulo."

"Ankaŭ vi", respondis Linda, kaj nun ŝi sentis sin tute senforta.

La patrino iris stari apud ŝi.

"He, panjo", diris Johano. "Mi estas laca. Mi volas dormi en la lito."

Li etendis siajn brakojn al ŝi.

La patrino ĉirkaŭprenis lin por porti lin supren al lia ĉambro.

Linda iris al la fenestro.

Alte en la ĉielo ŝi vidis ion, kio aspektis kiel falstelo.

Sed io estis stranga – la stelo estis frostege blua kaj ĝi falis supren.



KJELL E. GENBERG

naskiĝis en Hudiksvall, meznorda Svedio, je 1940 kaj komencis verki je 1966. Ĉell verkis dum sia longa kariero ĉirkaŭ 300 eldonitajn librojn kaj estas tial probable la verkisto kun la plej multe eldonitaj libroj en Svedio.

Multaj el ili estas tradukitaj al aliaj lingvoj,
sed *Diableto* estas lia unua al Esperanto.

Ĉu vere librego kun sorĉa skribaĵo
povas transformi tre dolĉan
knabeton al vera diableto?
Al iu, kiu minacas la fratinegon
per tranĉilo kaj komencas
fajron per siaj fingroj?

